


Francisco Menéndez Rúa, facile rekoneblaj, ankaŭ aliaj kiuj, ŝajne, aperas sur la unua foto kiun ni komentis. Sed estas ankaŭ aliaj tute ne konataj kaj inter ili ne malpli ol kvar katolikaj pastroj. Krome du el tiuj pastroj ŝajnas esti iome altrangaj; iliaj vestaĵoj ŝajnas indiki ke ili estis kanonikoj aŭ io simila. Tio igas nin pensi ke temas pri kunsido de la estraro de la **Katolika Centro**, sed tiukaze ne kongruas la ĉeesto de tri infanoj en la grupo, nek la flago de **Astura Esperanta Asocio**, bone videbla malantaŭ la grupo. Alie, la grupo estas tre multenombra por temi pri estraro de iu Asocio. Ĉiuj tri cirkonstancoj apogas la tezon ke temas pri lernokurso de Esperanto, sed tiukaze estas ne verŝajna tiom granda partopreno de pastroj en la sama kurso. Antaŭ la manko de preciza informo ni povas fari supozon, kaj nia opinio estas ke temas pri la partoprenantoj en Esperanta lernokurso sed konsentis pozi por la foto ankaŭ kelkaj altranguloj de la **Katolika Centro** por esprimi sian simpation kaj apogon al Esperanto. En tiu periodo, kiun ni difinas kiel de renaskiĝo de la esperantista afero, oni povas konstati apogon al Esperanto en ĉiuj sociaj sektoroj, tiel en la burĝa, konservema klaso, el kiu nestis ideologia referaĵo tiu religia centro, kiel en la laboristaj kaj maldekstraj soci-tavoloj kies ideologioj estis la anarkiismo, la socialismo kaj la tiam naskiĝanta komunismo.

Interesa novaĵo de la periodo kiun ni priraportas estis la komenciĝo de la okazado de la Hispanaj Kongresoj de Esperanto. La unua okazis la jaron 1920 en Barcelono. Ĝi, pli ol “Hispana” povus esti nomata “Ibera”, ĉar la partoprenantoj estis hispanaj kaj portugalaj, same kiel la pritraktitaj temoj de la kongreso. La dua okazis la jaron 1921 en Zaragozo, kaj havis, ankaŭ ĝi, Iberian rangon kaj karakteron. La Loka Kongresa Komitato estis, kompreneble, la E-asocio “Frateco” de Zaragozo. Notindas ke nur unu monaton antaŭ la okazigo de la kongreso, tiu E-grupo ricevis 326 aŭstrajn geinfanojn, orfoj de la Granda Milito, kiuj estis poste distribuitaj inter kelkaj hispanaj lokoj, inter ili kelkaj asturiaj urboj kaj vilaĝoj.
En la jaro 1922 ne povis okazi la planita, por Madrido, Iberia E-kongreso, kaj ankaŭ ne okazis la kutima Kataluna E-Kongreso kaj aliaj, planitaj, de kelkaj hispanaj regionoj. La kaŭzo de tiu ŝajna bremsado de la hispana esperantismo estis la morto, tiujare, de kelkaj gravaj esperantistaj aktivuloj, kaj aliaj cirkonstancaj malfacilaĵoj. Sed en la sekva jaro, 1923, normaliĝis la situacio de la hispana esperantismo kaj reiĝis la okazado de la E-kongresoj en nia lando. La Tria Hispana Kongreso de Esperanto okazis tiujare en Valencio, kaj ties Honora Prezidanto estis la Reĝo Alfonso la 13a. Pli ol la du antaŭaj, tiu kongreso havis